RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
10/07/2019 08:57:33

Finiĝas laborsesioj de la parlamentaj komisionoj

Havano, 10 jul (RHK) Post intensaj agotagoj, la 10 konstantaj komisionoj de la parlamento finas hodiaŭ la debatojn kiuj antaŭas la trian ordinaran laborperiodon de la 9-a leĝofaro.

Inter la temoj por la hodiaŭa laboro estas la batalo kontraŭ deliktoj kaj sociaj maldisciplinoj, la akcidentoj trafikaj, inter aliaj, precizigis la informagentejo Prensa Latina.

Aliaj temoj ekonomiaj kaj servaj estos same traktataj en la hodiaŭaj debatoj.

Dum la laboroj de la komisionoj ĉi-semajne elstaras la aprobo de raportoj de la leĝo-projektoj pri elekta leĝo, naciaj simboloj kaj fiŝkaptado, kiuj devos esti fine aprobitaj dum la plenkunsido okazonta dum la semajnofino.